


La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato William PEACE

dimanĉon, la 5-an de Julio, 2015 • numero ses

Kio okazos hodiaŭ?

★ 8:30 – 12:15 atm
Lecionoj en *Flowe*



★ 2:00 – 3:15 ptm
Kristana diservo
aŭ

Prezento: Mia ĝardena fervojeto

Jen elekto. En la unua etaĝo de *Flowe*, Tejloro gvidos kristanan diservon. Samtempe, en apuda ĉambro, Paŭlo faros amuzan prelegon pri sia fervoja ŝatokupo. La prezento taŭgos por komencantoj.

★ 3:15 – 4:30 ptm: KTF-prezento
pri scenar-verkado en *Flowe*

Karlo MAYS prezentos pri verkado de scenaroj por teatraĵoj kaj filmoj. Laŭdire, kontribuos al la konversacio ankaŭ Paul GUBBINS.

★ 7:00 – iam: KTF-fermovespero kaj
prezento pri Esperanto-TV en
Flowe

La fermo de la KTF-programo. Riĉardo DELAMORE parolos kun ni skajpe pri siaj spertoj kun Esperanto-Televido.

Poste ni spektos kaj pridiskutos tri filmojn originale en Esperanto.

Finfine, Derek montros al ni malneton de la filmo, kiun oni ĵus faris ĉi tie dum la pasintaj kvin tagoj.

La NASKa Fasko

Redaktejo: Finley 112

<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro. Trovu ĝin matene en la komuna ĉambro ĉe la unua etaĝo de nia loĝejo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 112, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al:

<nask.esperanto@gmail.com>

Aliaj tempoj

Paŭlo GUBBINS

Mi memoras, tre klare, kiam mi la unuan fojon vojaĝis sola eksterlanden, do sen gepatroj. Kiam mi havis 16 jarojn mi pasigis tri semajnojn kun familio en Belgujo por praktiki la francan lingvon (kaj, kion mi ne antaŭe sciis, bier-trinkadon). Unu jaron poste, kiam mi havis 17 jarojn, mi loĝis kvaronjaron kun germana familio (denove por praktiki biertrinkadon, pardonu, la germanan lingvon).

Kial ĉion ĉi diri? Nu, simple por miri, kiom ekde la 60-aj jaroj ŝanĝigis komunikado. El Belgujo kaj el Germanujo mi komunikis kun familianoj perpoŝte, sendante poŝtkartojn aŭ leterojn. Nur unu fojon mi telefonis, por informi pri alvenhoro. Telefoni multe kostis, aparte eksterlanden: necesis eniri ĉefpoŝtoŝticejon, doni la numeron diskumotan al ĝiĉetisto, kiu poste indikis budon kun telefono kun la mendita linio. Finkonversacie oni revenis al la budo kaj pagis (multon) depende de la daŭro de la voko.

Tiel restis la sistemo, laŭ mia sperto, dum la 70-aj jaroj, kiujn mi pasigis almenaŭ parte en Kanado. Aerpoŝton mi uzis por komuniki kun parencoj en Eŭropo: la servo ne tute fidindis kaj bezonatis inter tri (malofte) ĝis sep tagoj por ricevi aerpoŝtaĵon. Denove, pro la kosto, mi malofte telefonis: nur okaze de naskiĝdatrevenoj aŭ similaj eventoj.

Tamen aperis Interreto. Imagu, kiam mi gastis ĉe Lusi kaj Vilĉjo HARMON en la malfruaj 1990-aj jaroj, mi restis en sporada kontakto kun mia edzino per Interreto. Mi uzis la komputilon de Vilĉjo por retmesaĝi kaj – mirakle! – legi datenojn kaj gravajn dosierojn, kiujn mi surdiske kunportis.

En sekvaj jaroj surtablaj komputiloj fariĝis porteblaj kaj, se oni tamen ne volis kuntreni ja sufiĉe pezan “porteblan” komputilon, eblis prunti komputilon kaj aliri al datenoj, inkluzive de fotoj, pere de mem-orstangeto. Tiel la situacio dum la 2000-aj jaroj, kiam ekzemple mi NASKumis.




Antaŭ du jaroj mi ĉeestis la UK-on en Islando. Mi kunhavis mian porteblan komputilon. Du semajnojn poste mi aĉetis tabulkomputilon *iPad* kaj foriris, kun malpli peza valizo, al Italujo kaj la tiea landa kongreso.

Kaj la saman tabulkomputilon mi uzas nun por tajpi ĉi tiun artikolon. Per ĝi (kaj per alia mirinda inventaĵo, la t.n. inteligenta poŝtelefono – verdire mi preferas “poŝkomputilon”, ĉar tia ĝi estas), mi restas en kontakto kun la mondo. Antaŭ kelkaj momentoj, danke al mia fidinda *iPad*, mi uzis *what'sApp* por paroli vid-al-vide kun mia edzino... senpage (do ne enkalkulante la koston de la aparato), rekte, klare kaj, mi emas diri, tute nature.

Tiel, iasence, forlasinte la hejmon por vojaĝi, por eksterlandumi, oni ĝin ne forlasas. Ne tute. Vian hejmon, viajn familianojn, vi kunportas kun vi. Kia kontrasto kun la fora epoko de poŝtoŝticejaj telefonbudoj!





Haveblaj libroj

Liĉjo alportis al NASK kelkajn brokantajn librojn por vendi al iuj, kiuj interesiĝas. Bonvolu kontakti lin por ekscii pli. Jen kelkaj el la haveblaj libroj:

<i>Plena Vortaro de Esperanto</i> (malgranda formato)	\$10
<i>Step by Step in Esperanto</i>	\$8
<i>Esperanto-English Dictionary</i> (Butler, firma bindo)	\$15
<i>Esperanto-English Dictionary</i> (Butler, papera bindo)	\$12
<i>Fundamento de Esperanto</i> (nova)	\$23
<i>Esperanto Dictionary</i> (Wells, 1 st edition)	\$5
<i>Teach Yourself Esperanto</i> (2 nd edition)	\$5
<i>Comprehensive English-Esperanto Dictionary</i> (nova)	\$19
<i>Esperanto: Learning and Using the International Language</i>	\$8

Lumoj!

Ben SPEAKMON

Kiel bruaj lampiroj, multkoloraj birdoj,
flavblankaj sunetoj, sangitaj streketoj,
la inkeca blu' de plej profunda revo –
Brilas ili tiel en kvieta menso.

Sed ne hazarde aperas varioj;
Per malespera fonto,
El neatendita deziro
Nun tenas min novaj verdiroj.

Kolero pri svinganta arbo,
Dubo, perdo, kaj la rimedo,
Regas min dum tuta nokto –
Silentas tie, laŭ tiu vojo.

Mirinde eblas toleri ĝin!
Espera ŝildo ja gardas min.
Nuna trankvilo ĉirkaŭas nin,
Mi faru nenion, krom ami vin.

Reago al pentraĵo


Derek ROFF

Ĉu en tiu bildo, plenpacas, aŭ male,
ĉu ja tiu urbo minacas grandskale?
Ĉu tie, maldekstre, aperas la luno,
aŭ eble, tre ore, lumigas la suno?
Ĉu tie videblas homaro eskapa,
aŭ plaĉe promena, male al Cappa?
Flamoj kaj fumo elfluas el tuboj
sed klaras la fono, sen pluvo aŭ nuboj.
Laŭ Ĝiulio, kuraĝuloj serĉas sur luno
homojn benitajn de dia Fortuno.
Malplaĉajn aferojn, nur, vidas l' poeto
Ni serĉu belecon, jen mia ĉefpeto.



Bildo © Beletra Almanako

Kial ĝi ŝaŭmas?



Eble vi jam rimarkis, ke la fontano ekster nia loĝejo estas plena ne nur de akvo, sed ankaŭ de ia stranga... ŝaŭmo. Jen nokta foto kiun faris Ray REDD (dankon, Ray!) per longa ekspono.

Ĉu temas pri studenta petolaĵo? Ŝajne ne. Ray skribis: “Laŭdire la sapŝaŭmo tieas ĉar akvo uzita por purigi la promenejon eniris la fontanon.”

Esperanto ĉirkaŭ ni



Liĉjo trovis la jenan ŝildon ĉe loka vendejo. Ŝajne la floroj bedaŭras siajn pekojn. Cetere, ili pentas ne nur per pot', sed ankaŭ per flat'.